



## Monata bulteno internacia.

Redakcio kaj Administracio: Salo Grenkamp-Kornfeld, Kraków, Dietla 62.  
 Jara abono: 10 Kr. aŭ 3 Fr. 50. (Por Kongres-Polujo 6 M.)

*Pro la malfrua apero de nia februara n-ro kaj ankaŭ pro la subita forkomando de nia redaktoro el Krakovo al Nowy Targ, ni estis devigitaj nun eldoni duoblan n-ron. Klopodu ĉiujn korespondantojn direkti al Nowy Targ.*

### Prof. Carlo Bourlet

25. IV. 1866 — 12. VIII. 1913.



PROF. CARLO BOURLET.

La konata matematikisto, Prof. Carlo Bourlet naskiĝis en Strassburg. Li faris siajn klasikajn studadojn en

sia naskurbo, kaj poste en Bourges kaj Paris. Akirinte la diplomojn de „licenciato por matematikaj kaj fizikaj sciencoj“ (1887) kaj de „agregaciulo de matematikoj“ (1888), li obtenis, tri jarojn poste, la titolon de doktoro de sciencoj. Li instruis poste en diversaj alt lernejoj i. a. en la „Nacia Lernejo de Belartoj“ kaj kiel profesoro de mekaniko en la „Konservatorio de Artoj kaj Metioj“.

Krom kompletaj kursoj de aritmetiko, algebro kaj geometrio, eldonitaj de la konata firmo Hachette kaj uzataj ne nur en preskaŭ ĉiuj kolegioj aŭ liceoj de Francujo, sed ankaŭ en Hispanujo kaj Sudameriko, li verkis pli ol dudek verkojn de puraj aŭ aplikataj matematikoj.

Varbita al Esperanto en la j. 1900, de Prof. Ch. Méray, li estis unu el la ĉefaj protagonistoj, el la plej agemaj propagandistoj kaj energiaj de-

fendantoj de nia lingvo. Li sukcesis interesigi al Esperanto la potencon francan Turing-Klubon kaj la plej grandan eldonejon de Francujo (Firmo Hachette). Li estis vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Esp. Kongresoj kaj li iniciatis la ideon de la Xa Kongreso en Parizo.

En 1906 li fondis kaj ĝis fino de sia vivo direktis *La Revuo*.

## Franca lingvo — „helpa“ lingvo internacia?

La instituto de Solvay en Brukselo sendis al la pakonferenco peton pri akcepto de la franca lingvo — kiel internacia „helpa“ (!). Pri tio-ĉi havis en „Societo Esperanto“ en Kraków paroladon nia kunlaboranto s-o Leo Turno kaj ni citas ĉi-tie ĝian mallongan resumon.

Komencante la refuton, ni devas komenci de la fino: „Francujo turnis al si ĉies atenton per la gloriplena parto, kiun ĝi prenis en la milito ktp.“ Ĉu tio-ĉi povas esti motivo por alpreni la francan lingvon kiel lingvon internacian? Neniam! La milito ne povas influĵi tiel la internacian vivon, ke la militvenkinto altrudu sian lingvon al la tuta civilizita mondo, ĉar tio-ĉi estus simple anekso, kiel faris Germanujo en 1870, sed aliforma. Io alia estus, se la nacioj mem elektus la fr. lingvon kiel l. i.; en la nuna tempo ili eble faros ĉi-tion, volante varbi la simpatian de la venkinto. Sed iom post iom la simpatio de Francujo ne estos tiel grava por la nacioj kaj ili, ĉe unua okazo, forancelos de siaj ŝultroj la superpezon de Francujo kaj elektos eble alian lingvon, de alia potenculo, tiam por ili simpatia, kaj la problemo de l. i. ne estos solvita.

Resumo: *La solvo de la problemo de lingvo internacia ne povas esti dependa de la politikaj ŝancoj, sed de la internacia bezono de liberaj nacioj.*

Sed se ni tiel prijuĝas la aferon, ni forgesus ankoraŭ, ke la superpö-

tenco de la franca lingvo efektive ne ekzistas en la supredirita grado; ĉar krom la franca lingvo ankoraŭ ekzistas ĝia forta, eble eĉ pli forta konkuranto, la lingvo anglo-amerika. Tiuj-ĉi du lingvoj, la franca kaj la angla, nepre disputos inter si kaj interbatalos pri la supereco. Kaj kia povas esti la rezulto de tiuj-ĉi bataloj? Laŭ nia opinio el tiuj-ĉi bataloj, kiel venkanto, elirus — la angla, se kontraŭ tiuj-ĉi amo ne kontraŭstarigus io alia, nome la internacia demokratio, kiu penas malpermesi, ke unu kulturo kaj lingvo superu ĉiujn aliajn sole pro la fakto, ke ĝi estas la internacie akceptita. Kaj el tiuj-ĉi bataloj venkos certe la internacia demokratio de la malgrandaj kaj mezgrandaj nacioj kaj kun ĝi venkos la internacia helplingvo Esperanto.

Univ. Prof. J. Baulouin de Courtenay

## ANTISEMITISMO KAJ ESPERANTO

(speciale verkita por „Esp. Voĉo“)

La iniciato de l' registaroj kaj de diversnomaj „patriotoj“ plej granda krimo tutmonda t. e. la lasta milito, kiu ĝis nun ne finiĝis kaj finiĝi ne povas, alkondukis la homaron al stato de barbareco kaj sovaĝeco, al absoluta morala kaj spirita ruino t. e. al ĝenerala malnobliĝo kaj malsaĝiĝo. La nunan eŭrop-amerikan homaron oni povas kompari kun organismo elcerpita pro malsano, kiu estas eksterordinare konvena grundo por bakterioj kaj ĉiuj parazitaj. Ankaŭ potencigis diversaj kontraŭsociaj aferoj, sidantaj profunde en la denaskaj homaj sentoj de reciproka malestimo kaj malamo. Al tiuj abomenaj aferoj apartenas inter aliaj: antigeismo<sup>\*</sup>) (malamo de he-

<sup>\*</sup>) Kiu feliĉe ne ekzistas inter la esperantistaro.

breoj al nehebreoj) kaj antisemitismo (malamo de nehebreoj al hebreoj).

Neeble ŝajnus supozi, ke antisemitismo povus ankaŭ refleksi en la esperanta mondo. Ja Esperanto, same kiel ĉiuj aliaj artefaritaj lingvoj internaciaj, naskiĝis de l' ideo de tuthomara „frateco“ aŭ almenaŭ „solidareco“.

Dro Zamenhof pasigis siajn junajn jarojn en Białystok, en urbo loĝata de multaj diversreligiaj, diversgentaj kaj diversnaciaj homoj, kiuj reciproke sin malamis, reciproke sin akuzadis kaj reciproke batalis. Tio kaŭzis al li neelparoleblan doloron. Tenante sin super tiu abomena malpaco kaj direktante sin per sento de tuthomara frateco, Zamenhof konkludis, ke tiujn eternajn antagonismojn oni povus eviti aŭ almenaŭ multe pli malgrandigi i. a. per eltrovo de komuna lingvo internacia.

Certaj obstinaj fanatikuloj (eĉ tiel instruita kaj talenta homo, kiel Prof. K. Appel) asertas, ke ĝi devas anstataŭ la „ĵargonon“ kaj aliajn lingvojn hebreajn por plifortigi la tutmondan potencon de hebreoj kaj por garantii al ili la regadon super la mondo. Nu, tio estas naiveco de senkonsciaj kaj nekorekteblaj fanatikuloj. La kreinton de Volapük neniu iam suspektis je deziro krei komunan interkomprenilon por ĉiuj „nehebreoj“ kontraŭ la hebreoj, aŭ nur por ĉiuj „kristanoj“, aŭ eĉ por sole „katolikoj“ kontraŭ la alireligianoj.

La senreligieco kaj sennacieco de Esperanto estas klara kaj senduba; kiu enskribiĝis en la vicon de ĝiaj adeptoj ne havas rajton sin direkti per religiaj antaŭjuĝoj aŭ intergentaj antipatioj.

Kaj tamen mi ekscias, ke ĝuste sur Varsovia grundo okazis dank' al antisemitismo, disrompiĝo inter la Esperantistaro. La Esperantistoj „nehebreoj“ ne deziras aparteni al espe-

ranta, societo, al kiu apartenas ankaŭ hebreoj. Direktante sin per la principo de „koŝera“ (rite pura) pureco, ili ne volas makuligi sin per aparteno al anaro malpurigita per hebreoj. Ili volus kompreneble, ke fondiĝu en Varsovio du societoj esp-istaj; unu pure kristana, sen riproĉo koncerne la purecon, alia mi-ksita, kun videbla supereco de hebrea elemento.

Oni forgesas ankaŭ, ke dro Zamenhof mem estis de hebrea deveno. Al tio indus aldoni, ke li perfekte posedis la polan lingvon kaj de l' kultura vidpunkto konsideris sin polo kaj estis solidara kun la pola socio. Sed antaŭ ĉio li levis sin super ĉio, kio diferencigas kaj disigas la homojn kaj konsideris sin tuthomo, membro de l' tuta homaro (homarano). Ŝajnas al mi, ke tia homo havis je tio absolutan rajton.

Oni riproĉas al dro Zamenhof, ke li ne estis „patrioto“ pola. Mi ne analizos tiun demandon. Mi kontentigos min nur per citado de tio, kion mi antaŭ ok jaroj diris:\*) „Estas du patriotismoj:“

1) Patriotismo de banditoj kaj internaciaj ekspropriguloj t. e. nacionalista patriotismo kun devizo „nacia egoismo“, de reciproka ekstremo je dupieduloj, diferencigantaj per religio, lingvo, tradicioj, konvinkoj, patriotismo, kiu ŝanĝas la „patrujon“ en malliberejon de kondamnitoj, en kaĝon de diversspecaj sovaĝbestoj, en inferon loĝatan de naciismaj posedatoj.

2) Patriotismo teritoria kun devizo de egalrajtoj por ĉiuj civitanoj de l' komuna patrujo, por ĉiuj diversreligianoj, diverslingvanoj, diverskonvinkanoj, kun devizo de solidareco en la mono de komuna patrujo, en la amplekso de l' teraj bonaĵoj kaj sur ĉi tero atingebaj“.

\*) El „Krytyka“, Kraków 1911, paĝo 43.

## LA PREGO AL....

## „ESPERANTISTA VOĈO“

Dediĉita al s-o Kritikoviĉ.

*Al Vi, ho potenca sinjor' redaktoro,**Fortulo, verkistojn reganta,**Al Vi, granda homo, poeŝ', bratoro,**Versist' kaj prozist' Vi giganta,**Al Vi, kies nomon poetoj ripetas,**De kiu monpagon ni ĉiuj ja petas,**Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas**Hodiaŭ mi preĝas.**Al Vi mi ne venas kun verko ŝtelata,**Nek frukto de fremda laboro**Silentas nun ĉiu la sent' plagiata**Kaj regas nur amo al oro.**Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,**Kun ĝi la plej bela kaj tiom kristala**Nun venas mi, petas kaj preĝas en koro**Al Vi, redaktoro!**Versaĵojn mi skribas perfekte kaj bele,**Sed ili pereas fatale**En korb' redaktora, amase, sencele**Kaj mi ja suferas morale.**Mi volas famiĝi, sopiras mi gloron**Por venki obstinan, amatan la koron.**Kaj tial kompatu min, bona Vi homo**Je Dia la nomo!**Kaj Vian la „Voĉon“ mi ĉiam kantglores,**Se mian presigos Vi verkon**Kaj ĝin mi eterne, senfine favoros**Kaj sendos eĉ novan burleskon,**Ĉar havas mi multajn, multegajn rakontojn**Priskribas mi ĉion, militajn eĉ frontojn**Kaj laŭdos Vin ĉiam sen ĉes', sen ripozo**Mi ankaŭ en prozo!*

Joŝo.

## ĤINA RAKONTO

(DI JIDIŜE VOĤ 1912 Nr. 13)

Vivis iam en la ĉiela lando — en Ĥinujo mi pensas — du mĵopaj personoj. La nomo de unu el ili estis Ĉing, kaj tiu de la dua — Ĉang. Kaj jen tiuj ĉi du viroj ĉiam nur disputis: ĉiu el ili kriis, ke li pli bone vidas

ol la dua, ke per unu rigardo li vidas dekojn da mejloj, ke la dua estas blinda, vidas nenion, ktp. ktp.

Foje okazis jena historio: oni eksciis en la urbo, ke sur pordegon de Pagoda (Ĥina monaĥejo) oni fikso elpendaĵon. Kio estos skribita sur la elpendaĵo? Neniu tion ĉi scias. Ĉing kaj Ĉang tuj interdiskutegis.

— Eble Vi ankaŭ legos la elpendaĵon? turnas sin Ĉing al Ĉang:

— Kompreneble, mi legos, kia demando! Respondas Ĉang kolere. Mi havas dank' al Dio, okulojn kaj mi legos.

— Ha, ha, ha! — ekridis Ĉing — Rigardu lin kaj liajn okulojn! La nazon vi vidas per viaj okuloj?

— Pli bone ol vi mi ja ĉiaokaze vidas — respondas Ĉang.

— Vi estas ja blinda kiel bambua bastono. Kaj nenio bona elirus el tiu ĉi interbatalo, se ne enmiksiĝus Ĉu-ĉa-fo, saĝa Ĥino, kiu aŭskultis la tutan interparoladon.

— Por kio vi diskutu? — demandis li — Kiam oni estos fiksimta la elpendaĵon vi ambaŭ stariĝos sur la dua flanko de la strato, kaj vi povos legi. Tiamaniere oni ekvidos, kiu el vi pli bone vidas.

Bone!

La konsilo ekplaĉis al ambaŭ ĉielaj civitanoj kun la helaj okuloj. Kaj efektive, Ĉu-ĉa-fo estas ja saĝulo.

Sed tuj post la fikso de l'elpendaĵo Ĉing mallaŭte alŝtelrampis tre proksime al la pordego. Rigardante la elpendaĵon de tiel proksime, ke la spaco inter ĝi kaj lia nazo ne superis du colojn, li tralegis la jenajn vortojn: „Al Buddo, la plej granda profeto de la estinteco kaj estonteco“.

Post tio li forŝtelrampis, lernis parkere la vortojn, rigardis ankoraŭ unu fojon kaj — hejmen.

Trompi ne estas ĝentile, kompreneble. Sed vi opinias, ke Ĉang estis pli honesta? Post duonhoru alrampis ankaŭ li singardeme al la pordego, ĉirkaŭrigardis ĉu iu vidas, alproksimiĝis la nazon ĝis la elpendaĵo mem kaj ekvidis tial ankoraŭ ion.

Krom la suprecititaj vortoj sur la elpendaĵo estis skribite per malgrandaj literoj: „Pentristo Ling.“

Ripetinte tion ĉi kelkfoje iris Ĉang hejmen.

La morgaŭan tagon okazis la ekzameno. Ĉing kaj Ĉang stariĝis sur la dua flanko de la strato kaj komencis rigardi.

— Mi vidas la literojn klare! — ekkriis Ĉing. — Jen mi legas: „Al Buddo la plej granda profeto de la estinteco kaj estonteco“.

— Guste! — diris Ĉang. — Sed vi ne legas plu. Malsupre estas skribita: „Pentristo Ling.“

— Kia Ling? — Kriis ne per sia voĉo Cing. Nenio estas skribita.

— Estas skribita! — kriegis Cang, sed vi estas blinda, do kiel vi povas ĝin vidi?

— Mi — blinda? — ekkoleriĝis Cing — Vi blinda hundo! Mi estas blinda kaj vi bonvidanta?

La ambaŭ rigardantoj ekkaptis sin reci-proke ĉe la harligoj, kaj eksplodis lukto je vivo kaj morto.

Je tiaj kriegoj elkuris el la Pagoda bramano, la sankta pastro.

— Kio okazis? — demandis li timigita.

Kio? — kriis Cing. — Jen tiu ĉi blinda ĉevalo diras, ke li pli bone legas la elpendaĵojn ol mi.

La pastro rerigardis:

Kian elpendaĵojn?

— Jen tiun, kiu pendas sur la pordego de l' monaĥejo.

— Pro Dio! Kion vi babilas? La elpendaĵojn oni ja forigis hieraŭ vespere. Nun pendas nenio.

Cing kaj Cang alproksimiĝis kaj efektive ekvidis ke sur la pordego nenio elpendaĵo troviĝas.

Kaj hontigitaj ili disiris hejmen.

Esperantigis *Edvardo Lonkopolanski*.

## EDIFANTA HISTORIO

Loĝantoj de iu itala vilaĝo posedis mulon, kiu estis necesa por la tuta vilaĝanaro. La vilaĝanoj interkonsentis, ke tiu, ĉe kiu la mulo laboros, estas devigita ĝin nutri.

Kiam la mulo alvenis al la unua kamparano, tiu ekopinis, ke ĝi estos bonege nutrita la sekvantan tagon kaj li mem ne bezonas ĝin nutri. Kaj li nenion donis al ĝi. La dua kamparano ekpensis, ke hieraŭ la mulo bonege certe satmanĝis, kaj morgaŭ oni ĝin nutros aliloke, sekve estas tute senbezone manĝigi ĝin hodiaŭ. Tiel fariĝis. La tria kampulo opinis, ke la stomaka trosarĝo povus malutili la mulon kaj li ankaŭ donis al ĝi nenion. La kvara suposis, ke neniel povus malutili restigi la mulon dum unu tago sennutre, same agis la kvina kamparano, kaj ĉe la sesa la mulo falis teren, tiel ŝtupo.

Tiel pereis tiu utila estaĵo.

La anekdoto, same ĉarordinara, ripetigas, bedaŭrinde, ĉe tro ofte je la redakcioj de niaj esperantaj gazetoj. Kiom da abonantoj pensas: „ĉi-tiuj niaj kelkaj spemiloj signifas nenion por la redakcio, ja la aliaj

pagos“, kaj ili ne sendas la monon ŝuldan por la gazeto.

Tiel pensas kaj agas multo kaj la mankoj altiĝas kun la tempo tiom, ke la redakcio (devigita pagi paperon, presadon kaj poŝton) fine ne povas ekzisti kaj — la gazeto, kvankam utila — pereas.

Edifaĵo el la suprecitata estas, ke oni devas neprokrasti la transsendon de l' mono, kaj ne senkulpigi sin, ke la aliaj certege sendis l' abonpagon — do unu abonpago malpli ne multe malutilos la redakcion, ĉar pro simila rezonado, la gazetoj ne povas disvolviĝi kaj perfektigi kaj ofte ĉesas ekzisti. Ĉiu leganto devas abonatan gazeton pagi en la difinita tempo senatende, ĉar ĉiu malfruiĝo kaj prokrasto subfosas la ekzistadon de nia gazetaro.

*W. Janczurowicz.*

## INTERNACIA KONFERENCO DE L' PACIFISTAJ SOCIETOJ

En Bern (Svisujo) finiĝis ĵus la Internacia Konferenco de l' Pacifistaj Societoj, kiun ĉeestis delegitoj el Anglujo, Itallando, Svisujo, Germanlando, Hungarlando, Danujo kaj multaj gastoj el aliaj landoj.

La plej grava afero preparolita estis la afero de l' Ligo de Nacioj.

Dum la plennombra kunveno klarigis la prezidanto, ke per la franca projekto la ideo de Ligo de Nacioj ne faris grandan antaŭenpuŝon. La 10 marto oni unuanime akceptis jenan rezolucion de dro Haeblerlin (Svisujo):

La Ligo de Nacioj devegas 1) certigi daŭran mondpacon, 2) reguligi la plej gravajn interrilatojn materiajn inter la nacioj kaj 3) subteni kaj faciligi la kunlaboron de nacioj sur la kultura kampo.

El niaj samideanoj ĉeestis s-oj prof. Forel (Svisujo) kaj Miss Buxton (Anglujo).

Niaj tutjaraĵ abonantoj ricevos senpage „Albumon de Kraków“.

## Pola Societo Eldona.

Jam delonge mi pripensadis ĉu ne estus eble ĉe ni ankaŭ iom pli intensive labori por nia ideo, ol ĝis nun oni tion faradis.

Tamen sur ĉiu paŝo oni sentas dolorigan mankon. Ni tute ne havas poresp-ajn broŝurojn en pola lingvo, lernolibroj estas preskaŭ elĉerpitaj kaj nenio nova aperas.

Ĉu fine ni ne povus ankaŭ pripensi fondi fortan Eldonejon kun kunhelpo de ĉiuj polaj esp-istoj?

Pri tio mi parolis siatempe kun nia fervora samideano s-o prof. Kronenberg, kiu tuj deklaris 500 K. se oni fondos iam akcian societeton. La saman sumon promesas deklari ankaŭ la subskribinto de ĉi tiu artikolo.

Jen kion skribas prof. Kronenberg:

„Por fondi tiaspecan eldonejon estis en Polujo nur malgrandaj provoj, el kiuj preskaŭ ĉiuj finiĝis sen dezirita efiko. Kaŭzo de tiuj ĉi malprosperoj estis ĉiam la sama: Ĉiuj eldonejaj provoj estis entreprenoj de unu aŭ du personoj kaj tiamaniere ilia eldonejo estis jam de sia naskiĝo mortigonta, ĉar estas neeble por unu homo krei eldonejon, kiu postulas unue monon, due monon kaj trie ankoraŭ unu fojon monon...“

kaj jen, kion skribas s-o Ŝapiro:

„...Plej bone estus, se oni fondus akcian eldonejon, kiu eldonus la „Esp. Voĉon“, polajn propagandilojn, esp. literaturaĵojn k. t. p. Tiu eldonejo devus esti la centro de la esp. vivo en Polujo; same kiel la librejo „Esperanto“ en Moskvo estas centro por Rusujo. La akcioj estu malaltaj (100 aŭ 50 Kronaj) por ebligi ĝian aĉeton ne nur por la Esp. societoj, sed eĉ por privataj, izolaj esp-istoj...“

Ni do turnas nin al samideanoj, kiuj volus kunhelpi en la laboro por tiu ĉi celo, ĝis kiam estos fondota Organiza Komitato, ke ili bonvolu transdoni siajn adresojn al: s-o Ŝapiro, Białystok, Lipowa 33.

Por jam antaŭenpuŝi la aferon, ni faras nun la enketon pri la akcia societo:

Ĉiu izola esp-isto, Esp. societo, delegito de U. E. A., Komerĉa firmo

k. t. p. respondu je sekvantaj demandoj:

1) Kia estas Via opinio pri la fondota akcia societo?

2) Ĉu Vi havas iajn proponojn koncerne ĝin (dezirinde estus, ke la samideanoj ellaboru kaj sendu projektojn de la regularo k. t. p.)?

3) Se Vi aprobas la fondon, por kiom da Sm proksimume Vi povus aĉeti akciojn?

4) Kiajn proponojn pri reformo, pligrandigo aŭ t. p. de la eldonota pluen de la societo „Esp. Voĉo“ Vi povas fari?

Ĉiuj demandoj, je kiuj oni deziras ricevi tujan skriban respondon devas nepre esti akompanataj per poŝtmarkoj por respondo.

La templimo por respondo estas difinita je du monatoj, post kiu tempo oni aperigos la raporton en „Esp. Voĉo“.

*Salo Grenkamp.*

## DUA KONKURSO.

Esperantista Voĉo decidis malfermi duan konkurson inter siaj tutjaraj abonantoj.

### KONDIĈOJ DE LA POEZIA KONKURSO:

1e Verki originalan poemon aŭ versajon prilaudantan amon al homaro.

2e Sendi per rekomandita poŝto la manuskripton al la Redakcio de „Esperantista Voĉo“ antaŭ la 1. de Aŭgusto 1919.

La juĝantaro disdonos la sekvantajn premiojn:

1. Premio: „For la batalilojn“ de von Suttner, 10 n-roj el Esp. Bibl. Internacia kaj 50 esp. poŝtkartoj.

2. Premio: La nova testamento kaj 5 n-roj el Esp. Bibl. Internacia.

**Por eviti prokraston en la regula ricevado de E. V., bonvolu tuj renovigi la abonon.**

## ĈI-TIE KUŜAS EN PACO...

Malamiko forkuras rapide...

Niaj streĉigaj marŝoj ne povas lin atingi. Espero kaj entuziasmo, batalvolonto kaj venkocerteco plenigas korojn, montriĝas en la lacaj, ŝvitantaj kaj tamen gajaj vizaĝoj, esprimiĝas en raŭkaj voĉoj, kantantaj marŝtaktan melodion. Kaj eĉ la naturo ŝajnas sampensi, ĝi ornamis sin per verdaĵo, la suno radibrilas sur ŝvitgulantaj fruntoj. Ĉio respiras per ĉi-tiuj sentoj.

Regimento haltis por ripozo. Sur vasta kampo elkreskis subite centoj da tendoj. Vigla vivo ekregis sur senhoma antaŭe vastaĵo.

Pelita de la komuna sentaro, mi iras grenkampojn, malproksime de homa scivoleco travivi la epopeon de ĝisnunaj venkoj. Sur la tuta batalkampoj rapide antaŭeniras niaj armeoj, forkurigante la malamikon. Ĉie regis ĝojo. Ĉiu soldato estis konvinkita, ke nia afero estas justa kaj tiu konscio plenigis lin je forto neimagebla.

Kaj ankaŭ mi same pensis kaj ankaŭ min la samaj sentoj plenigis kaj ankaŭ al mi la justeco de nia afero ne ŝajnis duba. Niaj militistaj fortoj ne estas grandaj kaj tamen ni venkas; ni venkas ne per fortoj de l' amaso, ni venkas per interna sento, ke ni estas pravaj kaj niaj agadoj — justaj.

Do, ni devas beni tiujn homojn, kiuj volis militon, ĉar ili donis al ni okazon pravigi ilian pensmanieron; oni devas ilin bondeziri, ĉar ili esprimigis la sentojn de ĉiuj, ili kunigis malamikajn partiojn kaj ili elvokis entuziasmon en ĉiuj sferoj de la popolo. Ili ne devis rigardi la oferojn, kiuj estas necesaj kaj kiuj devas sekvi tian militon. Kion signifas vivo de miloj kaj eĉ de centoj da miloj, se oni povas gajni tiajn rezultojn en ĉiuj sociaj kaj politikaj sferoj!

Tiaj pensoj trakuris mian cerbon kaj mi estis preta defendi ilin ĝis la lasta spiro de mia vivo...

Subite montriĝis al miaj okuloj malamikaj tranĉeoj. Scivoleco min ektiris al tiu-ĉi direkto. Mi volis ekvidi, kiel batalas la kruela, sanga kaj tamen timema malamiko, por povi lin sammaniere kontraŭbatali. Mi sciis, ke li estas majstro en konstruado de tranĉeoj kaj ke tiuj-ĉi estas nepreneblaj, se ilin defendas kuraĝaj soldatoj. Ni venkas ilin per nia interna forto, kiun li — timemulo — ne posedas, ni posedprenas ilin per nia animsupereco, kiun li ne povas kontraŭstari.

Miaj paŝoj direktiĝis tien, sed tre baldaŭ ia odoro ektuŝis mian flarserton. La odoro estis tute neordinara kaj mirinde similis malbonodoron de kadavro. Eble troviĝas proksime ia kadavro, de hundo, ĉevalo aŭ de ia ajn besto; aŭ eble de... mi ekstaris pensante pri ebleco — eble de homo. Mi rapidis direkton de malbonodoro kaj al niaj okuloj montriĝis terura aspekto.

Sur tero inter la greno kuŝis morta malamika soldato kaj apude kato, lekanta malbonodorantan teron eĉ la kadavro. Kun vizaĝo turnita teren, pafilo en la mano — la kadavro prezentis tremigantan aspekton. Ĝi certe kuŝis ĉi-tie jam longe, eble du semajnojn, pluvo ĝin lavis, la suno ĝin sekigis, ke restis nur ostoj, kovritaj per haŭto, vestitaj en nova uniformo kvazaŭ por enterigo. La morto trafis lin subite, mi dirus embuske, ĉar la vundo estis sur lia dorso, la kuglo devis eliri de post li; eble li mortis el mano de siaj?!..

Kaj mirinde, en tiu momento, kiam mi ekvidis lin ĉi-tie kuŝantan, miaj antaŭaj pensoj kaj sentoj, miaj sonĝoj pri venkoj malaperis, forflugis ien. Antaŭ ĉi-tiu bildo mi forgesis ĉion, kion mi anime travivis.

Ĉu tia estas sorto de ĉiu soldato?! Morti ie en fremdlando, nekonata, forgesita kaj forlasita de siaj kameradoj, eĉ ne enterigita — tia estas soldata difino?!

Jes! — tiel mortas ĉiu soldato kun negrandaj diferencoj, ke eble ia pli malkruela mano elfosos kavon kaj enterigos lin kaj ke simpla kruco ekstaros sur lia ripozejo. Tre ofte oni vidas inter grenkampoj, apud vilaĝaj kabanoj, en ĝardenoj kaj eĉ sur tombejoj, maltrankviligante pacan civitanon en eterna ripozo, ĉie, kie nur nia rigardo povas penetri, simplajn krucojn, elkreskantaj subite antaŭ niaj okuloj.

Kaj jen unu el miloj, kiu bezonas novan tombon sur tero, destinita por alia celo!

Eble ankaŭ mi sekvos lin?!

Kaj en ĉi-tiu momento ekkaptis min volonto alkonduki ĉi-tien tiujn sinjorojn, kiuj kaŝis kaj puŝis al milito; al kiuj neniu ofero estis granda; al kiuj vivoj de miloj ne estis baro; kies koron ne ŝargis larmoj de gepatroj, gefratoj; kies konscienco ne teruris la sango de iliaj oferoj! Kion signifas por ili miloj da homaj vivoj?! Ili ja disponas je milionoj! Ili ja ne volas vidi kriplulojn!

Tiujn-ĉi sinjorojn mi volus starigi antaŭ ĉi-tiu sola homa kadavro, por ke ili ekvidu nur ĝin, nenion plu! Mi ne montrus al ili batalkampon kun ĝia terureco, ĉar tie oni vidas heroajn streĉigojn kaj heroojn! Tiun-ĉi malamikam kadavron, kuŝantan en greno, kun pafilo en la mano kaj la katon, lekantan ĝian sangon — ili ekvidu! Kaj ilia animo terurigis, ilia koro ĉesus bati, iliaj nervoj dissiriĝis — kaj ili revenus ĉefurbon kun neatendita decido!..

Kaj miaj nervoj ne povis jam plu elteni!..

Kelkaj bonvolemaj soldatoj enterigis tiun-ĉi mizeran kadavron kun abomeno, sed ankaŭ kun ia kunmikso de mizerikordo kaj kompreno, ke ilia sorto povas esti tia!

Sur nova tombo elkreskis ankoraŭ unu kruco, kies brakoj montris al ĉielo surskribon:

„Ĉi-tie kuŝas en paco malamika soldato!..“

Ukrainujo 25. VII. 1918.

Alf,

## Diversaj komunikoj.

Esperanto en la lernejoj. Laŭ la decido de la Salzburga Nacia Konsilantaro estas Esp. instruota en la popol-lernejoj de urbo kaj lando Salzburg.

Okhora labortago por la anglaj deputitoj. En la angla parlamento aperis movado celanta enkondukon de okhora labortago por la deputitoj. Pro la ofta komision-kunsidado laboras multaj deputitoj ofte 12 horojn tage.

U. E. A. Okaze de la forpasinta dekjara datreveno de U. E. A. la Komitato de U. E. A. sendis al H. Hodler siajn dankesprimojn pro lia granda kaj sindona laboro por la nun sole funkcia centra organizaĵo, kaj gratulas je lia edziĝo. Okaze de l' jubileo de U. E. A. ni plene subskribas la dankleteron de la Komitato. Samtempe ni komunikas la novan adreson de U. E. A. kaj ĝia organo „Esperanto“: Bern, Museumstr. 14.

**Grandeĝa sukceso!** Pola Esp. Societo proponis al Kongreso de instruistoj, okazinta en Varsovio, enkondukon de Esp. en lernejojn; ĝi estis akceptita kaj estos pere de profesiaj reprezentantoj starigita kiel propono en la seĝmo (pola parlamento)!

## Tra la libroj.

*La eldonistoj, kiuj deziras, ke E. V. raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj, ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

*La dorna karesilo* de Bela Manto. Varsovio 1917, 32 paĝa, Prezo 4 K. Ricevebla ĉe Adm. de „Esp. Voĉo“.

Unu fenomeno tre bedaŭrinda en nia literaturo estu ĉi tie ĵusita: Aperis kelkaj veraj poetaj talentoj, dronintaj tamen en amaso da sableroj, kiujn konstante versfarantoj, nenion havantaj por diri, plenmane ĵetadas en la okulojn de esp-ista legantaro. La rezultato estas vere tagreniĝa: La publiko ne volas legi versaĵojn, la gazetoj presigas ilin nur tial, ĉar ĝi timas perdi abonanton en ofendita aŭtoro, la recenzantoj, ekvidinte kelkajn paĝojn da versaĵoj, ricevas naŭzon kaj ne leginte, ĉiun poeton traktas per same dolĉeta akreto da kelkaj stereotipaj laŭdetaj vortetoj, — kaj fine vere originala poeto, aperiginte kelkdekono da verkoj, silentiĝas por ĉiam, senkuragiĝite

kaj ne dezirante esti enmiksita en aregon da senvaloruloj.

Tio devis esti dirita kiel antaŭparolo al malgranda libreto de aŭtoro, kiu unufoje donas al ni specimenojn de sia talento, kaj devis esti dirita, ĉar ekzistas danĝero, ke li ne spertu la supre rakontitan sorton. Kaj tiun ĉi li tute ne meritis, ĉar la dudeko da publikigitaj fabeloj distingiĝas per tiel klasika humoro, observa talento kaj la kapablo enpremi la homajn mankojn en la kadrojn de konvena alegorio kaj fine tiel profunde kaj libere sin sentas en la vestoj de la turnita kaj rimita formo, ke vere estus domago, se tiuj ĉi fabeloj, anstataŭ esti antaŭdirito de io pli granda, fariĝus — cigna kanto.

Necble estas ĉi tie pli longe preparoli la enhavon, sed atento estu turnita almenaŭ je kelkaj fabeloj, kiuj firme ligiĝas kun nia lingvo. „Menedo kaj aeroplano“, „Kokino kaj inkubatoro“, „Azeno kaj lokomotivo“ ekzemple povus esti tradukitaj neeligve kaj bonege utilis kiel argumentoj de la propagando de Esperanto, kelkaj aliaj certe pripensigus ĝiajn reformemulojn. Tial estontaj kolektoj de materialo por iu Krestomatio esperanta ne forgesu pri ĉi tiuj fabeloj.

Kaj al la poeto esprimita estu bondezirito de sukceso sur la plua vojo „ad astra“.

*Baroko.*

*Vintro-fabeloj* de Heinrich Seidel, trad. I. Bicker, 1918, Ader & Borel, Esp-o-eldonejo, Dresden Al. 163 paĝa. Prezo 2 M. + 10<sup>o</sup> u.

Neniu fako de esp-ista literaturo estas tiom disvolviĝinta kaj tiom pliriĝigata, kiom tiu por la infanoj en la aĝo de 8—12 jaroj. Tiom da diversaj fabeloj aperis rilate kompreneble al aliaj verkoj belliteraturaj — ke la verdstelaj etuloj estas bone provizitaj. Ĉar tamen da tiuj etuloj nuntempe estas certege ne pli ol kvindeko sur la tuta terglobo, do estas demando, ĉu valoras pliriĝigadi ĉi tiun fakon, kun domago por la iom pli aĝa legantaro. Oni povas nur supozii, ke la tradukantojn de ĉiujpecaj verkoj gvidas la nobla ideo doni legaĵojn al infanoj, bezonantaj ĝin proksimume post 100 jaroj; ĉar ne pli frue oni povas atenti amasan esperantistigon de okjaruloj.

Tiaj pensoj malgraŭvole premiĝas dum la legado de nove aperinta tre ĉarma kolekto de fabeloj de Germana verkisto Seidel, kiuj distingiĝas per fraŝeco, simplaco de tenoj kaj ĉiuj kutimaj ecoj, kaj dekjaraj legantoj ekstreme ŝatas. La tradukon rekomendas du faktoj: unue, ke ĝi estas rekomendita de Esperantista Literatura Arĥivo kaj due, ke ĝin eldonis la firma Ader kaj Borel. Ĝi tiuj rekomendoj la dua estas pli rekomendanta. Ĉar uz okazis ankoraŭ, ke ĉi eldono



nejo, bone komprenanta sian negocon kaj tial objektive juĝanta la prezentitajn al ĝi por eldonado verkojn, estus aperiginta ion grave pekantan kontraŭ la Zamenhofa idiom. Dume E. L. A. sukcesis kelkfoje „rekomendi“ ordinarajn gramatikaj erarojn.

*Baroko.*

*Esperanto Bucherschau*, Mitteilungen über das gesamte Esperanto-Schrifttum (Nr. 1. Januar 1919). Aperas neperiode. Eldonita de Ader kaj Borel, Esperanto-Verlag, Dresden 1. Struvestr. 40.

*Die Welthilfssprache*, Flugblätter zur Förderung und Verbreitung des Esperanto im deutschen Sprachgebiet herausgegeben von der Deutschen Esperanto-Zentrale, Dresden 1 (Flugblatt Nr 1, Nr. 2).

Tre rekomendindaj flugfolioj, la unua — kvarpaĝa, la dua — sespaĝa, aperis sub tiu ĉi titolo.

## El la mondo esperantista.

**Finlando.** En tiu ĉi bonege prosperas nia afero. Nenian ĉi-tie estis tiel forta nia movado kiel nun kaj ĉio dank' al la fervora agado de nia samideano Vilho Setälä, al kiu kunhelpas aliaj fervoruloj. Kelkaj plej gravaj gazetoj aperigas ĉefartikolojn pri nia movado. „Otava“ komencis aperigadi tutan serion da ili! Niaj fervoruloj ekkuraĝis eĉ aranĝi la kvinan kongreson en Helsingfors, kiu okazos dum pasko kaj daŭros tri tagojn. Al la instrua fako(?) de la Senato estas donita petskribo subskribita i. a. de profesoroj universitataj Krohn, Ramstedt, docentoj univ. Lunelund, Tallgren, Väisälä, dro Runeberg, rektoroj Kerppola, Virkkunen, kun propono fondi Ŝtatan Esp.-instituton por edukado de esp. instruistoj, enkonduki Esp. en la mezajjn lernejojn kiel laŭvolan aldonan fakon, permesi enkonduki Esp. en la studplanon de la instruistaj seminarioj, permesi al popoliernejaj instruistoj, posedantaj diplomon de la supre nomita instituto, instrui Esp. al siaj lernantoj kaj enkonduki Esp. en la blindullernejojn. La estro de la lerneja administracio kaj la kulturministro estas favoraj al la propono.

Kursoj okazas en Helsingfors, Lahti, Lapua, Viborgo k. t. p. En Tempere estas Esp. enkondukita en la studplanon de la popola altlernejo.

**German-Aŭstrio.** Graz: Post preskaŭ kvinjara interrompo Stiria Esp-ista Societo rekomencas vigran agadon. La anoj kunvenas ĉiusabate en restoracio Winterbierhaus, I. Bürgergasse. Oni malfernis ankaŭ Esp.-oficejon, kiu troviĝas VI., Schönaugasse 6/2. Marburg: La anoj de loka grupo de Sti-

ria Esp. Societo, parte germanoj, parte slovenoj, dum la milito fervore propagandis kaj diligente studis Esp. sub gvidado de l' prez. D-ro Haas.

**Hungarlando.** En Budapeŝto okazis en la lastaj monatoj multaj prelegoj. La registaran komisiiton de la scienco universitato, Oszkár Jászi, petis esp-ista deputacio, ke li permesu la esp. instruadon en la dua semestro. La permeso alvenis kaj jam la 7 marto komencis Dro L. Lóránd siajn prelegojn. La deputacio estis ankaŭ ĉe la ministro-prezidanto Berinkey, kiu bonvole promesis sin okupi kun la afero. Nun estas 7 kursoj gvidataj kun la helpo de la landa societo. En Szeged, Temesvár kaj Ungvár okazas kursoj, en la lasta urbo partoprenas ilin 200 p.

**Polo.** Krakovo: Le 13 februaro okazis ĝenerala kunveno de Societo „Esperanto“, kiun ĉeestis ĉ. 30 p. Post vigla diskuto pri ĝisnuna kaj estonta laboro oni elektis novan estraron: prez. prof. Bujwid, vicprez. S. Rudnicki, sekr. J. Alfus, kas. K. Zajczkowski, bibl. L. Srebrna kaj s-oj B. Kuhl, M. Piotrowski, prof. J. Orzech. El plej gravaj decidoj estas starigo de du sekcioj: la unua celas aranĝadon de interesplenaj jaŭd-kunvenoj, la dua propagadon de Esp. per prelegoj, kursoj, k. t. p.

La sekcioj tuj komencis sian laboron, kiun plifaciligis la nova societejo (Rynek 15.III). La jaŭd-kunvenoj fariĝis tre viglaj kaj estas bonvizitataj. Ĉiam okazas iaj prelegoj. Ĉitindaj estas: la prelego de L. Turno pri „Esp. kaj franca lingvo“ kaj vespero je honoro de A. Grabowski, pri kies vivo kaj meritoj parolis s-o Alf, ĉefajn partojn el „Sinjoro Tadeo“ deklamis s-o Ŝrenkamp. Agrablaj fariĝis ankaŭ la te-kunvenoj, dum kiuj oni prelegis, deklamis, kantis kaj dancis. Oni aranĝis du kursojn, gvidataj de s-oj Kuhl kaj Turno.

Kiel gastoj vizitis nin d-ro Mikołajski (el Leopolo) prezidinto de la Oka, nun direktoro de la regiona saniga oficejo kaj prof. Kronenberg (el Orlowa), kiu prelegis pri Esp. movado en Silezio. Parolante pri la interna ideo, kiun oni devas nepre atentadi, li akcentis, ke la interrilatoj inter la ĉeĥaj kaj polaj esp-istoj, malgraŭ la milito, estas bonaj!

La Societo elektis unuanime dum eksterordinara ĝenerala kunveno s-on Antoni Grabowski ĝia honora membro.

Lodzo: La 7 februaro okazis la malfermo de la unua granda tritaga Esperanto-ekspozicio, aranĝita de „Lodzja Esperanto Societo“ en la ejo de art-pentrista societo. La unuan fojon en Lodz flirtis la verda standardo je la ĉefstrato de la urbo! La bonege organizita ekspozicio havis multajn diversajn fakojn: Zamenhofa, kongresa komerca, gazetara, literatura, muzika, turisma, mondarmila, lodza k. t. p. S-ino Za-

menhof bonvole pruntis por la Zamenhofa fako la orajn insignojn, rubandojn donacalbumojn k. a. objektojn de la Majstro. La vizitantoj de la ekspozicio estis gvidataj de deĵorantaj gesamideanoj, kiuj klarigis, al ili ĉiujn ekspoziciaĵojn. La lasta fako, al kiu la vizitantoj cetere jam mem venadis, estis la „varba kaj informa“, kie oni akceptis aliĝojn por kursoj kaj societo. Entute enskribiĝis por kursoj 42 personoj kaj aliĝis al la Societo 44. Tiamaniere ekspozicio ebligis la malfermon de du novaj grupoj (unu en pola kaj unu en germana lingvoj), gvidotaj de s-ro J. Zys kaj J. Szapiro. Pro la granda sukceso la ekspozicio devis esti plilongigita je ankoraŭ unu tago. La ekspozicion vizitis entute 600 personoj (el ili 164 lernantoj), inter ili ankaŭ multaj samideanoj, ĵus revenintaj el Rusujo. El Varsovio speciale al la ekspozicio alvenis la tiea Del. de U. E. A. s-ro Oberrotman. Ĉiuj lokaj gazetoj aperigis notojn pri la ekspozicio, la germana „Neue Lodzer Zeitung“ krom tio ankaŭ dediĉis sian dimanĉan felietonon al la ekspozicio.

Por subteni la „Esperantistan Voĉon“ kiu nun estas la sola esperanta gazeto en Polujo, la estraro de Lodza Esp. Societo decidis aboni 50 ekz. da ĝi por siaj membroj. Imitinda ekzemplo!

Varsovio: La 17 februaro okazis la ĝenerala kunveno de Pola Esp-o Societo. Kiel kunsidedro estis elektita s-o prof. dro A. Czubyński. La sekretario Czubyński tralegis la protokolon. Post alpeno de budĝeto okazis elekto de l' estraro: Prez. Ing. A. Grabowski, vicpr. dro Robin kaj univ. prof. Emil Loth, sekr. Z. Grefkiewicz kaj Z. Kostecki, bibl. A. Bankiewicz, kas. Essigman, rev. kom. dro L. Zamenhof, A. Zakrzewski, ing. Teuchfeld, prof. Czubyński, ing. Szejman, K. Tymński, Mikulski. Ĉeestis la edzino de nia Majstro s-ino dr Zamenhof.

Ni ĝojas, ke en Varsovio oni ankaŭ fine rekomencis la laboron, je kiu ni tiel longe atendis. Ni esperas, ke la du nun ekzistantaj societoj klopodos kunigi, memorante nian karmemoran Majstron, ke ĉiuj samideanoj, kiuj ĝis nun multe inter si — bedaŭrinde — batalis, ekkomprenos la gravecon de komuna sincera kunagado, ĉar nur per kunigitaj fortoj, nur per reciproka sinŝatado ni atingos nian celon. Do kune al laboro sub nia verda standardo!

Rusujo. Ankoraŭ la 23 julio 1917 fondiĝis en Moskvo Organiza Komitato de Tutruslanda Esp-ista Federacio, kies celojn ni priskribos iom pli detale en la proksima n-ro. La 15 decembro 1918 aranĝis la Moskva Ligo de Junaj Esperantistoj okaze de la 59 datreveno de la naskiĝotago de nia Majstro solenan kunsidon. Ĝi ankaŭ decidis reorganizi sur bazo de komuna laborado kun la Tutruslanda Ligo de Junaj Espe-

rantistoj. Ĉiuj anoj ricevos de nun ankaŭ la organon de „T. L. d. J. E.“ la „Junan Mondon“, Kaj nun la plej grava novaĵo. Oficiala telegramo de Rosta (rusa telegrafa agentejo), kies daton ni ne povas bedaŭrinde konstati, sciigas jenon: „Moskvo. Laŭ la decido de la Lerneja Sekcio de la Popola Klerigada Komisariato ĉe la Sekcio estas organizata Komisiono por prilaboro de la demando pri nedeviga instruado de la internacia lingvo. Tiu komisiono havas la taskon prilabori sekvantajn demandojn: 1) Pri internacia lingvo; 2) pri artefarita internacia lingvo; 3) pri la ebleco de nedeviga instruado de la internacia lingvo kaj pri la metodoj de la instruado. Nuntempe la komisiono estas okupita per la studo de sekvantaj demandoj: a) pri la stato de disvastiĝo de diversaj sistemoj de internacia lingvo; b) en kiuj limoj estas ebla la aplikado de la internacia lingvo k. a.“

Kvankam en tiu telegramo estas nek unu vorto Esp. tamen estas preskaŭ certe, ke la komisiono elektos Esp. tiom pli, ke nia fervora samideano Evstifeieff estas ĝia ano. Krom tio kiel oni sciigas al ni en la oficiala organo de la rusa registaro „Izvestija“ estas regule publikigitaj artikoloj pri Esp. kaj internacilingvaj demandoj.

Svedujo. Kursoj okazas en Hofors, Malmö, Sandviken, Skulskär ktp. En Borgstena fondiĝis Klubo Esp-ista.

Hispanlando. Barcelona: La Komitato de la Kataluna Esp. Federacio decidis sendi petskribon al ĉiuj ministerioj de la ĉefaj militintaj landoj kaj al prezidanto de la Paca Konferenco por rekomendi la enkondukon de Esp. Sevilla: La tria Kongreso de la Andaluzia Esp. Federacio okazos la 27 aprilo. La sesa Kongreso de Esp. Provinco Tarragona Ligo okazis en Valls. Vigla movado okazas en Baracaldo Jerez de la Frontera, Sabadell San Fernando, Tarrasa k. t. p.

Uragvajo. Montevideo: La movado estas vigla. Dum la nacia kongreso de la laboristaro (oktobro 1918) la socialistaj centroj proponis: „Klopodi disvastigi Esp. ĉe la tutmonda laboristaro kaj celante, ke la lingvo de la internaciaj kongresoj estu Esp.“

## Nekrologo.

La norvega Esperantistaro perdis sian plej signifan anon, la prezidanton de Norvega Esperantista Ligo, stud. filol. **Bruno Riefling**. Kiel fulmo de sennuba ĉielo venis la terura informo, ke nur 23 jara li mor-

tis la 22 decembro 1918 pro pleŭrito post hispana malsano.

Per vortoj estas neeble esprimi la sentojn, kiuj trakuras niajn cerbojn eksciantajn pri tia nekomprenebla frapo de l' sorto, fortiranta tiel subite florantan junulon tiom gravan por la homaro.

Kia dolorego, ke tia ideala viro tiom trofrue forlasis la homan socion, kie batalantoj por la bono kaj la belo estas tiom bezonataj!

La memoro pri li longe vivu!

*Rolf. E. Bugge Paulsen.*  
*Cefleŭtenanto.*

(Eltiro el biografia noto en „La Espero“)

## Oferdonacoj por nia gazeto.

De Novembro 1918 ĝis Aprilo 1919 donacis:

1. S-o Grenkamp	150 K	— h
2. „ Dro Blassberg	20	— „
3. „ Lukaŝ	17	— „
4. „ Prof. Kronenberg	10	— „
5. „ Zajaczkowski	10	— „
6. „ Alf	7	— „
7. „ Temerson	5	— „
8. „ Piotrowski	2	— „
9. „ Rudnicki	2	— „
10. „ Orzech	2	— „
11. „ Kosmyra	—	50 „

Kune 225 K 50 h

Al ĉiuj por la tiel necesa subteno kaj helpo koran dankon!

## PAROLEJO.

### Peto pri informo.

Mia kuzo, samideano kaj U. E. A. ano Leo Agurtin el Bialystok studis antaŭ la milito en Grenoble (Francujo) kaj loĝis je Rue St. Joseph 4. Dum la milito li enarmeigis kaj militservis en la franca armeo (adreso: 23 Batterie du 202 d'artil-

lerie de Compagne, Secteur Postal 120). Depost preskaŭ unu jaro oni havas neniajn sciigojn de li.

Mi do tre petas ĉiujn samideanojn, sciantajn ion ajn pri lia sorto, tuj min informi pri tio. La esp-ajn gazetojn, precipe la franc. kaj ital-landajn mi petas pri represo.

*J. Szapiro, SD. de UEA.*  
Lodz (Polujo), Pańska 39 m. 10.

## Korespondado.

En tiu ĉi rubriko ni aperigas adresojn de korespondemaj esp-istoj por alproksimigi kaj interrilatigi niajn samideanojn.

Unu anonco kostas 1 K.

*Devo de ĉiu enskribinto estas respondi almenaŭ unu fojon al ĉiu ricevita karto!*

**Varsovio** (Polujo). S-o Feliksoto Lotto ul. Biata 3, pri diversaj temoj (belarto ktp.)

**Kraków** (Polujo). S-o Stanisław Krupinski, Mikolajska 2 volonte interŝanĝas p.-markojn kun seriozaj kolektantoj. Korespondas france kaj germane.

## ANIAJ REPRESENTANTOJ.

Laŭ komunikoj, ne ĉie povas esti sendata mono el eksterlando al ni. Kie personoj, kiuj deziras ricevi nian gazeton, ne povas senpere sendi la abonpagon, bonvolu ĝin sendi al koncernaj reprezentantoj:

**Nederlando.** S-o S. J. Degenkamp, Utreĥt, Bettehemvojo 36.

**Norvegujo.** F-ino Jørgensen, Kristiania, Tolengt 29.

**German-Aŭstrio.** S-o R. A. Čech, Vieno IX, D' Orsaygasse 7.23.

**Hungarujo.** S-o Paulo Bálkanyi, Buda-pesto VI, Hajós str. 15 II.

**Polujo.** S-o I. Chimowicz, Łódź, Długa 90, Tow. Esperanto, — S-o Wiesenfeld, Varsovio, Biata 3.

**Kiu ne plu deziras ricevi E. V., bonvolu informi nin pri tio.**

Jus aperis:

## „La Bulgara lando kaj popolo”

Kun etnografia karto de Iv. H. Krestanov

Tiu ĉi literatur-sciencia verko donas plenan bildon pri Bulgario (geografio, historio, kulturo, popola karaktero, lingvo kaj literaturo, Esperanta movado).

Prezo 6 Kronoj afrankite de la Adm. de „Esperantista Voco”.

NOVAJO!



NOVAJO!

En ĉia mastrumejo necesa kaj utiliga estas la aleno „Lumax”, por kunkudrado de ledo, — zonoj kaj ŝuoj, veturiltukoj, sakoj k. t. p. Jam pli ol 1 milionon oni uzas. — Pola aŭ germana aplikklarigo. — Unu peco kun 4 div. kudriloj kaj fadenobeno 5 K anta e pagotaj. 5 pecoj 22:50 K, poŝtrepage 50 h pli. Al vendistoj rabaton.

FABR.: KOMERCA DOMO

**M. PIEROŬEK kaj K-io**

Kraków, Karmelicka 9, Fako 7.

Originalaj nur kun la firma stampaĵo!

## „Das freie Wort” („La libera parolo”)

Germanlingva jurnalo por frata kunvivado de la homoj. Aperas ĉiumonate  
Redaktoro: Heinrich Zimmermann.

En ĉiu numero aperas priesperanta artikolo.

Prezo de unuopa numero  
80 fen. — afrankite 90 fen.

Ricevebla per la administracio de „Das freie Wort” — Łódź, Cegielniana 53.

VARSOVIA EKSPED- KAJ TRANSPORT- OFICEJO

ALEKSANDER RÓŬANYKWIAT

WARSZAWA, DŁUGA 23

ŁÓDŬ, KRÓTKA 5

KOMERCAJ-EKSPEDADO

AL ĈIUJ URBOJ DE POLUJO, LITOVUJO, KURLANDO, GERMANUJO

E. AŬSTRIO KAJ VICE VERSA

DOGANO. ENKASIGO. ASEKURADO DE ŜARĜAJOJ

KONTRAŬ TUTA KAJ PARTA ŜTELO

PROPRAJ TENEJOJ. KORESPONDANTOJ EN 42 URBOJ. ONI KORESPONDAS EN ĈIUJ LINGVOJ, ANKAŬ EN ESPERANTO.

Eldonata de W. Kornfeld en Kraków.

Respondeca redaktoro: J. Orzech

Presejo „Polonia” Jan Trybuła en Zakopane.